


LA PONTO

Tweemaandelijks tijdschrift van de Limburgse Esperantovereniging.



Jaargang 2, nummer 6 (12), maart-april 2010

Verschijnt op de eerste dag van iedere onpare maand.

Erkenningsnummer: P808228

V.U.: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel

Tel. 011-73.20.47 – E-mail: pieter-jan.doumen@telenet.be

LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)
Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.
Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato
Jarkolekto 2, n-ro 5 (11): januaro-februaro 2010
Ĉiuj antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas.
Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47
Retadreso: pieter.doumen@adsl4you.be

Redaktore

*Karaj Gelegantoj,
Nome de la estraro de LEA mi deziras al vi
feliĉan kaj prosperan novan jaron!*



La pasinta jaro estis plena je gravaj problemoj: financa kaj ekonomia krizo, varmiĝo de la tero, kiuj ambaŭ samtempe bezonas baldaŭan kaj bonan solvon. En 1977 prof. Polk de la Brusela Libera Universitato paroladis antaŭ la nordlimburga sekcio de la Fonduso Lodewijk De Raet pri la varmiĝo de la tero. Estis la periodo de la sekiĝo de Sahel en Afriko. Tiam oni ne aŭskultis la avertojn de la kelkaj sciencistoj. Nun, post 30 jaroj, oni rifuzas fari urĝajn aranĝojn por eviti katastrofojn...

La ĉi-jara vintro komenciĝis bruske, sed ĝustatempe, kun frostoj kaj neĝo post longa

periodo de milda vetero. Jam delonge ni ne plu vidis neĝon je Kristnasko. La pli junaj inter ni eĉ tute ne memoras, ke ili iam vidis ion tian. Tio havigis al ni belegajn bildojn, precipe la neĝo sur la arboj estas fineca vidaĵo kvazaŭ flandra puntlaboraĵo. Sed tiu vetero kaŭzis ankaŭ mizeron en la trafiko, precipe por la aviadiloj, kiuj ne povas forflugi ĝustatempe kaj tro longe tenas vojaĝantojn sur la grundo. Intertempe sub la kaprikorna tropiko oni mezuris temperaturjon de 40° C...

Ni deziras al vi agrablan legadon.

Pieter Jan Doumen

Letero de D-ro L.L. Zamenhof al Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko (1895) (2-a parto)

Brief van Dr. L.L. Zamenhof aan Nikolaj Afrikanovitsj Borovko (1895) (2^{de} deel)

“La problemoj estas solvitaj!” diris mi tiam. Mi kaptis la ideon pri sufiksoj kaj komencis multe laboradi en tiu ĉi direkto. Mi komprenis, kian grandan signifon povas havi por la lingvo konscie kreata la plena uzado de tiu forto, kiu en lingvoj naturaj efikas nur parte, blinde, ne-regule kaj neplene. Mi komencis komparadi vortojn, serĉadi inter ili konstantajn, difinitajn rilatojn, kaj ĉiutage mi forjetadis el la vortaro novan grandegan serion da vortoj, anstataŭigante tiun ĉi grandegon per unu sufikso, kiu signifis certan rilaton. Mi rimarkis tiam, ke tre granda amaso da vortoj pure radikaj povas esti facile transformitaj en vortojn formitajn (ekz. “patrino, mallarĝa, tranĉilo” k.t.p.) kaj malaperi el la vortaro. La meĥaniko de la lingvo estis antaŭ mi kvazaŭ sur la manplato, kaj mi nun komencis jam laboradi regule, kun amo kaj espero. Baldaŭ post tio mi jam finis skribi



la tutan gramatikon kaj malgrandan vortaron. Tie ĉi mi diros ĝustatempe kelkajn vortojn pri la materialo por la vortaro. Multe pli frue, kiam mi serĉis kaj elĵetadis ĉion senbezonan el la gramatiko, mi deziris uzi la principojn de la ekonomio ankaŭ por la vortoj kaj, konvinkita, ke estas tute egale, kian formon havos tiu aŭ alia vorto, se ni nur “konsentos”, ke ĝi esprimas la donitan ideon, mi simple “elpensadis” vortojn, penante, ke ili estu kiel eble plej mallongaj kaj ne havu senbezonan nombron da literoj. Mi diris al mi, ke anstataŭ ia 11-litera “interparoli” ni tute bone povas esprimi la saman ideon per ia 2-litera “pa”. Tial mi simple skribis la matematikan serion da plej mallongaj, sed facile elparoleblaj kunigoj de literoj kaj al ĉiu el ili donis signifon de difinita vorto (ekz-e: a, ab, ac, ad, ... ba, ca, da, ... e, eb, ec, ... be, ce, ... aba, aca, ... k.t.p. Sed tiun penson mi tuj forĵetis, ĉar la provoj kun mi mem montris al mi, ke tiaj elpensitaj vortoj estas tre malfacile ellerneblaj kaj ankoraŭ pli malfacile memoreblaj. Jam tiam mi konvinkigis, ke la materialo por la vortaro devas esti romana-germana, ŝanĝita nur tiom, kiom tion postulas la reguleco kaj aliaj gravaj kondiĉoj de la lingvo. Estante jam sur tiu ĉi tero, mi baldaŭ rimarkis, ke la nunaj lingvoj posedas grandegan provizon da pretaj vortoj jam internaciaj, kiuj estas konataj al ĉiuj popoloj kaj faras trezoron por estonta lingvo internacia, - kaj mi kompreneble utiligis tiun ĉi trezoron.



D-ro L.L. Zamenhof dum la Universala Kongreso en Bern, Svislando, en la jaro 1913

En la jaro 1878 la lingvo estis jam pli-malpli preta, kvankam inter la tiama “lingwe uniwersala” kaj la nuna Esperanto estis ankoraŭ granda diferenco. Mi komunikis pri ĝi al miaj kolegoj (mi estis tiam en la 8-a klaso de la gimna-

**BOUW
EXPO
TEGELEXPO
MIX-BETON
BOUWMATERIALEN**

DE LAAGSTE PRIJS DE HOOGSTE KWALITEIT,
EN ONZE EXTRA SERVICE ZIJN ONZE KENMERKEN!

PAESEN

EEN ZAAK VAN VERTROUWEN !

TEGELEXPO ☎ 011 66 55 54
BOUWEXPO ☎ 011 66 55 50

zio). La plimulto el ili estis allogitaj de la ideo kaj frapitaj de la neordinara facileco de la lingvo, kaj komencis ĝin ellernadi. La 17-an de decembro 1878 ni ĉiuj kune solene festis la ekvivigon de la lingvo. Dum tiu ĉi festo ni parolis en la nova lingvo, kaj ni entuziasme kantis la himnon, kies komencaj vortoj estis la sekvantaj:

*Malamikete de las nacjes
Kadó, kadó, jam temp' està!
La tot' homoze in familje
Konunigare so debà.*

(En la nuna Esperanto tio ĉi signifas: “Malamikeco de la nacioj falu, falu, jam tempo estas! La tuta homaro en familion unuigi sin devas”.)

Sur la tablo, krom la gramatiko kaj vortaro, kuŝis kelkaj tradukoj en la nova lingvo.

Tiel finiĝis la una periodo de la lingvo. Mi estis tiam ankoraŭ tro juna por eliri publike kun mia laboro, kaj mi decidis atendi ankoraŭ 5-6 jarojn kaj dum tiu ĉi tempo zorgeme elprovi la lingvon kaj plene prilabori ĝin praktike.

Duonjaron post la festo de la 17-a de decembro ni finis la gimnazian kurson kaj disiris. La estontaj apostoloj de la lingvo provis paroleti pri “nova lingvo” kaj, renkontinte la mokojn de homoj maturaj, ili tuj rapidis malkonfesi la lingvon, kaj mi restis tute sola. Antaŭvidante nur mokojn kaj persekutojn, mi decidis kaŝi antaŭ ĉiuj mian laboron. Dum la 5½ jaroj de mia restado en la universitato, mi neniam parolis kun iu pri mia afero. Tiu ĉi tempo estis por mi tre malfacila. La kaŝeco turmentis min; devigita zorgeme kaŝadi miajn pensojn kaj planojn, mi preskaŭ nenie estadis, en nenio partoprenis, kaj la plej bela tempo de mia vivo – de jaroj de studento – pasis por mi

plej malgaje. Mi provis iafoje min distri en la societo, sed sentis min ia fremdulo kaj foriradis, kaj de tempo al tempo faciligadis mian koron per ia versaĵo en la lingvo, prilaborata de mi. Unu el tiuj ĉi versaĵoj (“Mia penso”) mi metis poste en la unuan broŝuron eldonitan de mi; sed al la legantoj, kiuj ne sciis, en kiaj cirkonstancoj tiu ĉi versaĵo estis skribita, ĝi ekŝajnis stranga kaj nekomprenebla.

(*Daŭrigota*)

Kiu pentris D-ron Zamenhof?

(*Wie schilderde Dr. Zamenhof?*)

Temas pri la pentraĵo de D-ro Zamenhof sur la paĝo 3-a de la antaŭa numero de 'La Ponto.

Kara samideano Pieter Jan, la dekan numeron de ‘La Ponto’ mi legis kun multa intereso kaj plezuro. Mi dankas vin pro tio.

Pri la pentraĵo de Zamenhof mi volas ankorau rimarki ion. Nome, ke ĝi estas duoble interesa. Memkompreneble pro la pentrita Zamenhof, sed ankaŭ pro la pentristo. Lia nomo staras sub la bildo: Felix Stone Moscheles.



Portreto de d-ro L.L. Zamenhof pentrita en 1907.
de Felix Stone Moscheles (1833-1917)

La patro de Felix estis Ignaz Moscheles (1794-1870), unu el la plej famaj pianistoj de la 19a jarcento. La patro vivis dum kelka tempo en Londono kaj tie naskiĝis en 1833 lia filo Felix. Amiko de Ignaz Moscheles kaj baptopatro de Felix estis Felix Mendelssohn-Bartholdy (1809-1847) (mondfama germana

komponisto, n.d.l.r.). Tial la filo ricevis la antaŭnomon Felix.

Felix Moscheles estis tre konata artisto kaj pacifisto. Li esperantiĝis en 1902 kaj estis prezidanto de Londona Esperanto Klubo kaj vicprezidanto de Brita Esperanto-Asocio. Laŭ Marjorie Boulton, en ŝia libro “Zamenhof”, Moscheles renkontis kaj pentris Zamenhof jam en 1905. Post la 3a UK en Cambridge, en la jaro 1907, Zamenhof kun sia edzino Klara iris al Londono kaj tie gastis ĉe Moscheles

Felix Moscheles mortis en 1917.

Amike salutas Kees Bos.

Ankaŭ koran dankon al vi, sinjoro Bos!

Rememriĝo en FEL kaj LEA!

Karaj amikoj, se vi ankoraŭ ne renovigis vian membrecon ĉe FEL kaj LEA, ni urĝe petas vin fari tion kiel eble plej baldaŭ, ĉar la nova jaro jam komenciĝis, kaj asocioj ne povas funkcii sen via financa subteno. La kotizo por la membreco de FEL estas € 25,00. Ĝi inkluzivas la membrecon de LEA. Se vi deziras membriĝi nur ĉe LEA, via kontribuo estos € 12,50.

Kiel membro de FEL vi ricevos senpage la dumonatan revuon *Horizon.taal*. La membreco de LEA rajtigas vin ricevi ankaŭ senpage la revueton de LEA *La Ponto*. La bankkonto de LEA estas 735-0190144-12.

Se vi havas problemon koncerne FEL, jen ĝia telefonnumero: 03-234 34 00.

Koran dankon nome de FEL kaj LEA!

Omaĝo al prof. Ivo Lapenna

(*Hulde aan prof. Ivo Lapenna*)

Ĉi-jare ni omaĝas ankoraŭ alian gravulon de la Esperantomovado, prof. Ivo Lapenna, la konstruinton de la moderna UEA. De 1947 ĝis 1974, kiam li forlasis UEA post grava kverelo dum la 59-a UK en Hamburgo, lia influo sur la Esperantomovadon estis konsiderinda.

Li naskiĝis la 5-an de novembro 1909, en Split en la tiama Jugoslavio. Li havis multajn talentojn. Post sukcesaj studoj de nacia kaj internacia juro en la universitato de Zagrebo kaj doktoriĝo en 1933, li laboris en advokataj oficiejoj. Dum kaj post la Dua Mondmilito li faris brilan politikan karieron, sed en 1949 pro malkonsento kun la jugoslava reĝimo, li elmigris unue al Francio kaj poste al Anglio, kie li laboris ĝis sia emeritiĝo en 1977 kiel docento kaj poste kiel profesoro pri internacia juro en la *London School of Economics and Political Science* en Londono.

Li lernis Esperanton en 1928. La postan jaron li fondis la faman Akademian Esperanto-Klubon en Zagrebo, kaj dum pluraj jaroj li energie gvidis la internacian studentan Esperanto-movadon. Jam tiam lia elstaris kiel oratoro kaj organizanto. De post 1938 li estis komitatano de la Internacia Esperanto-Ligo kaj unu el la ĉefaj personoj kiuj sukcesis reunuigi IEL kaj UEA en 1949. Samtempe li estis prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo. En 1945 li refondis la Kroatan Esperanto-Ligon.



De 1947 ĝis 1950 li estis komitatano en la nova UEA, dum kiu periodo li prenis multajn sukcesajn iniciatojn. Tiutempe li multe kampaĵis por Esperanto en internaciaj organizaĵoj. Danke al lia senĉesa laboro la ĝenerala konferenco de Unesko, kunvenita en Montevideo, Urugvajo, akceptis en 1954 la faman Resolucion pri Esperanto. En 1955 li fariĝis ĝenerala sekretario de UEA, kiu transmigris al Roterdamo en 1961. Tri jarojn poste, en 1964, li fariĝis prezidanto de UEA, kio li restis ĝis 1974. Dum tio periodo de 35 jaroj, la organizaĵon atingis sian plej altan kulminon.

Kio do okazis en Hamburgo?

Kelkajn jarojn antaŭ lia morto mi vizitis Evert Wensing, kiu estis la tiutempa ĝenerala sekretario. Li rakontis, ke oni ne plu deziris Lapenna kiel prezidanton. Post tiom da jaroj kaj tiom da sukcesoj Lapenna diktatore regis UEA, kaj tial oni petis Wensing kandidatiĝi kiel prezidanto, kion li faris. Sed Lapenna konsideris tiun paŝon kiel perfidon kaj provon flankenmeti lin. Li akuzis la kontraŭulojn pri komunismo. La kve-relo kiu sekvis estis tiel doloriga, ke Lapenna kaj Wensing forlasis la movadon kun amaraj sentoj. Sekve la etoso en Hamburg estis tre malagrabla. Prof. Humphrey Tonkin, fariĝinte la nova prezidanto, daŭrigis la laboron de Lapenna, kiu neniam pardonis al

siaj antaŭaj kunlaborantoj kaj fondis novan organizaĵon, la Neŭtrala Esperanto-Movado (NEM). Estas bedaŭrinde, ke oni neniam provis aŭ sukcesis restaŭri la pacon.

Kvankam la meritoj de Lapenna estas grandegaj, kion ĉiuj rekonas, li estus devinta akcepti, ke ankaŭ en UEA devas regi demokratio. Malgraŭ liaj eraroj, oni devas doni al li la honoron kiun li meritas.

P.J. Doumen

Novaĵoj el Esperantolando

(Nieuws uit Esperantoland)

Belgio. – Beneluksa Esperantokongreso.


La Flandra Esperantoligo organizas de la 13a ĝis la 16a de majo 2010 Beneluksan Kongreson en Antverpeno kun lingva festivalo. La temo de la kongreso estas “la lingva diverseco en Benelukso”. Dum la lingva festivalo ni prezentos al vi i.a. la Brabantan, Frisan, Pikardan kaj Valonan lingvojn. Plie ni antaŭvidas nekutiman ekskurson en Antverpeno, nome tra la subtera kanalaro kaj poste reen surtere; kaj biciklan ekskurson al Saeftinge, belega naturparko, trans la limo kun Nederlando, kaj multon pli. Ni atendas ankaŭ partoprenantojn el ne-Benelukslandoj!

Pliajn informojn pri la kongreso kaj aliĝilon vi trovos ĉi tie:

<http://www.esperanto.be/kongreso/> .

Kun koraj salutoj,

Lode Vandeveld, prezidanto de FEL.



Francio 1: Nova germana ambasadoro en Moskvo. – Pluraj germanaj gazetoj, inter ili la konata magazino *Der Spiegel*, raportas, ke la nova germana registaro antaŭvidas sendi la ĝisnunan reprezentanton de Germanio ĉe NATO, s-ron Ulrich Brandenburg, kiel novan

germanan ambasadoron al Moskvo. Ulrich Brandenburg estas ne nur membro de la Germana Esperanto-Asocio, iama prezidanto de la Germana Esperanto-Junularo kaj membro de la loka grupo en Münster, sed ankaŭ denaska esperantisto. Lia nomumo en la nova posteno havis sufiĉe grandan internacian eĥon, sed ne aperis mencioj pri lia esperantisteco.

Ĉu koincidenco? Estas io stranga en la sendo de esperantlingva germana ambasadoro al Moskvo, antaŭvidita nur naŭ monatojn post la publikigo de la libro “La nova Eŭropo: Parizo-Berlino-Moskvo”, en kiu la aŭtoro Marc Rousset proponas al Eŭropo distanciĝi de Usono kaj krei novan akson, kaj krome la anstataŭigon de la angla per Esperanto en la rolo de lingvo internacia.

Henri Masson

Francio 2: Eo-reklamo en ‘Le Monde’ –

Etsuo Miyoshi estas fama japana esperantisto, prezidanto de sia prospera firmao Swany, kiu en la lastaj jaroj multe kaj signife kontribuis al la diskonigo de Esperanto per financado de tutpaĝaj reklamoj en la plej legataj gazetoj en deko da eŭropaj landoj.

Lige kun la 150-a jubileo de la naskiĝdato de D-ro Zamenhof s-ro Etsuo Miyoshi denove subvenciis aperigon de tutpaĝa Esperanto-reklamo, ĉi-foje en la gazeto *Le Monde* en Francio. La tutpaĝa reklamo estas videbla ĉe: www.ipernity.com/doc/32119/6831740.

Henri Masson


Francio 3: Malfacila angla ortografio –

Eĉ la denaskuloj de la angla havas grandajn problemojn kun sia lingvo. Jen kion oni povas legi en raporto de sondado de IPSOS MORI, plenumita en Usono por la *Spelling Society*.

Kvankam komence nur unu homo el kvar kredis havi ortografiajn problemojn, la rezultoj pruvas, ke pli ol duono de la loĝantaro ne kapablas senerare skribi oftajn vortojn kiel “*embarrassed*”. 40% de la usonaj civitanoj subtenus ĝisdatigon (plibonigon) de la aktuala ortografia sistemo. 63% de la usonaj civitanoj kredas, ke la ortografio de la plenkreskuloj nun estas pli malbona ol antaŭ dek jaroj. 60% kredas, ke la ortografio postulas pli da memoro ol da logika rezoando. La viroj montriĝas pli malbonaj ol la virinoj en ortografia testo pri dek gazetaj vortoj. Unu el tri angloj ne povas plenigi simplan formularon sen vortaro!

Usonanoj kaj angloj tamen volas altrudi sian lingvon al 95% de la homaro!

Henri Masson



Litovio: Pri Google kaj Lernu! –

Ne nur esperantistoj, sed ankaŭ Google solenis la 150-an naskiĝdatrevenon de Zamenhof. La plej potenca serĉilo de la mondo videbligis la Esperantoflagon en sia logotipo, kaj pro tio ni havis multege da vizitantoj, kion kompreneble ni multe ŝatis, sed nia servilo ŝajne ne . . . :-) Feliĉe ĝi tamen transvivis, se nur kun granda peno. Averaĝe *Lernu!* havas ĉiutage ĉirkaŭ 5000 unufojajn vizitantojn, hieraŭ ni ekhavis preskaŭ 29.000, do sesoble pli ol kutime.

La Esperanto-flago ne plu aperis, sed *Lernu!* kontinuas havi multe da vizitantoj. Danke al Google nun dise en la reto aperas multegaj artikoloj pri la hieraŭa okazaĵo. Multaj retgazetoj, blogoj kaj forumoj aperigis informojn pri la reklamaĵo, Esperanto kaj Zamenhof. Hodiaŭ ni plej verŝajne ne atingos novan rekordon pri unufojaj vizitantoj, sed ŝajne ni havos alian – la plej altan nombron da vizititaj paĝoj en unu tago. Averaĝe la vizitantoj rigardas ĉe *Lernu!* ĉ. 90.000 paĝojn ĉiutage, hieraŭ oni vizitis ĉ. 130.000 paĝojn. Sed hodiaŭ ni jam havas preskaŭ 150.000 paĝojn, kaj ĝis la noktomezo restas ankoraŭ multaj da horoj! Do ŝajne uzantoj kiuj venas hodiaŭ, restas ĉe *Lernu!* dum pli da tempo kaj trarigardas pli da paĝoj ol la uzantoj kiuj venis hieraŭ. Nun nin vizitas homoj kiuj legis pri Esperanto kaj pro interesiĝo revenas al nia paĝaro. Hieraŭ estis informtago, hodiaŭ estas tempo por varbado.

Jevgenij Gaus, 16.12.2009

Pollando: Studu aŭ instru en Bydgoszcz! –

Okaze de 150-a datreveno de la naskiĝo de L.L. Zamenhof La Internacia Studejo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz invitas ĉiujn esperantistojn veni al sia instituto:

Ĉiu povas ekstudi ĉe ISTK en Bydgoszcz por fariĝi internacia Esperanto-vojaĝgvidanto kaj poste diplomiĝi ĉe ISTK, eventuale baka-laŭriĝi kaj magistriĝi ĉe AIS, la Akademio Internacio de Sciencoj.

Ĉiu povas organizi grupon de studentoj por ISTK, ricevante 15% da rabato de ĉiu kotizo. Tiel, havante 7 kandidatojn por la studo, li mem ne bezonas pagi la studadkotizon.

Ĉiu kiu kapablas instrui en Esperanto turismon kaj kulturon, povas gvidi "Konsultejon de ISTK" omaĝe al Ludoviko Zamenhof.

La Internacia Studejo pri Turismo kaj Kulturo, funkcianta ekde 1991, estas laŭleĝe registrita ĉe la Kuratorio pri Edukado en Bydgoszcz. Laŭ dekreto de la pola Ministro pri Edukado de la 1-a de aŭgusto 2000 la findiplomoj de ISTK validas kiel oficialaj polaj dokumentoj rajtigantaj ĉiĉeronojn kaj vojaĝgvidantojn labori en Esperanto. La studjaro 2009-2010 daŭros ekde aŭtuno 2009 ĝis majo 2010 kaj ampleksos laŭ ĉiutaga sistemo po 30-40 studhoroj semajne (ferioj estas en decembro kaj januaro). Necesas partopreni almenaŭ la finekzamenan session 35 AKB/AIS dum la semajno de 17-25.04.2010.

Eventoj, Budapeŝto

Semajno de la Internacia Amikeco 2010

La dujara Semajno de la Internacia Amikeco en Loveno ĉi-jare okazos en **sabato la 6-a de februaro 2010**

ekde la 10-a matene ĝis la 8-a vespere en la etosplenaj skoltaj lokaloj ĉe la Snoy d'Oppuerslaan en Winksele, tuj apud Loveno. La fama abunda, antaŭe vespera, bufedo iĝos tagmeza bufedo, kaj vespere oni povas konsumi la ekstagmezan panmanĝon.

La programo koncentriĝos en la tago, dum la vespero estos rezervita al neformala babilado.


La ĉeftemo estos "vortludoj".

Ne necesas averti pri alveno, nur veni gravas, kaj ĉiu estos bonvena. Senpaga numero de nia revuo kun kompleta programo kaj persona invitilo estos sendita en januaro al ĉiu kiu petas ĝin ĉe info@esperanto3000 !

La konfeso de Renardo vulpo (De biecht van Reinaart de Vos)

Reĝo Noblo sendis Grimberton Melon kun juĝalvoko al Renardo Vulpo. La vulpo konsentas iri kun la melo al la kortumo, kie lin atendas kondamno. Dumvoje la hipokrita vulpo konfesas siajn pekojn al la melo por prepari sin al la morto. Li konfesas al li interalie la sekvantan 'ŝercon', kiun li faris al la lupulo Izen greno:

"Alian fojon, iutage, mi lin kondukis al vilaĝo en Vermandezo, kie loĝis tre riĉa pastro. En la kelo de tiu ĉi ekleziulo troviĝis lard', kolbasoj, ŝinkoj en granda kvant'. Mi tie ofte bonege manĝis. En la muro ekzistis, sub la tero, bela truet', tra kiu magra lupulo eniri povis. Mi lin igis tra ĝi enrampi. Da bovaĵo li tie trovis plenajn kuvojn kaj multajn ŝinkojn, kiuj pendis de la plafono. Granda kvanto de tiuj bonĝustaĵoj glitis tra lia avidega gorĝo. Li tiom manĝis, ke finfine li manĝi tute ne plu povis. Sed kiam li denove volis eliri tra la streta truo, la ventro estis tiel dika, ke ne plu eblis tra ĝi pasi.



Aŭdante lian laŭtan plendon, mi kuris for kaj grandan bruon en la vilaĝo faris. Tiam mi kuris en la domon, kie la pastro sidis ĉe bonege garnita tablo antaŭ brune rostita koko, la plej bela kaponio, kiun oni trovis en tiu lando. Tiun kokon

mi salte prenis de la tablo
per mia buŝo kaj forkuris.
La pastro, dume min rigardis
senfare, kvazaŭ ŝtoniĝinte,
sed tiam eksaltante kriis
kolere: 'Kaptu lin kaj batu!
En mia propra domo vulpo
de mia tablo rabas mian
kaponon! Estas neaŭdite!
O sancta Spiritus, min helpu
ekkapti tiun ĉi ŝteliston!
Tranĉilon li rapide prenis
kaj post mi kuris, renversante
la tablon, ĉion frakasante.
La kelo estis malfermita.
En ĝin mi fuĝis por eskapi
al la kolera pastro, kiu
blasfemis kiel herezulo,
kriante: 'Kapti lin kaj batu!
Unue min, sed poste lin!' La
tranĉilon li minace levis
kaj pelis min al Izengreno.
Mi tiam kun bedaŭro lasis
la kokon fali el la buŝo,
ĉar ĝi por mi tro pezis. Tiam
la pastro skoldis: 'Ha, ŝtelisto,
vi la ŝtelajon devas lasi!
Malmulte tio vin utilos!
Sed jam mi fuĝis tra la truo.
Levonte la ŝtelitan kokon,
la pastro vidis Izengreno.
Pro la obskuro lin prenante
por mi, li lerte ĵetis sian
tranĉilon kaj la lupon trafis
en lia kapo sub okulo.
La mastron sekvis kvin-ses viroj,
portantaj fortajn kverkajn klabojn.
Vidante Izengreno, ili
laŭtege kune ekkriegis
kaj furioze lin atakis.
Ĉe tiu nekutima bruo
forlasis sian domon ĉiuj
najbaroj por ekscii, kio
okazas. Baldaŭ ili sciis,
ke en la kelo de la pastro
troviĝas granda lupo, kiu,
provante el la kel' eskapi
tra eta truo, mem ĝin ŝtopis
per sia dika ventro. Kvankam
la homoj timas lupojn, ili
scivolaj venis en la kelon
rigardi tiun mirindaĵon
kaj ankaŭ puni la ŝteliston.
Pluvegis batoj sur la dorson
de nia povra Izengreno.
Post tio en la kelon venis
grupeto da junuloj, kiuj
lin tiel batis kaj turmentis,
ke li finfine el la truo
pli falis ol eliris. Ili



buŝumis lin, vindkovris liajn
okulojn, ligis pezan ŝtonon
je lia magra kolo, pelis
lin el la domo kaj incitis
la hundojn kontraŭ li. Ĉi tiuj
kolere bojis kaj lin mordis
en la postaĵo, lin pelante
tra ĉiuj stratoj de l' vilaĝo,
ĝis elĉerpita sur herbejon
li falis, kvazaŭ mortigita.
La tuta junular' jubilis,
lin metis sur brankardon, portis
el la vilaĝ' kaj krude ĵetis
lin en profundan truon, kie
la tutan nokton li pasigis."

P.J. Doumen

La tuta libro estas havebla ĉe UEA, FEL aŭ ĉe mi. Prezo: € 15,00 + sendokostoj.

Mia Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko (fino)

Mijn Esperantowereldcongres in Bialystok: slot)

Ĵaŭdon, la 30-an de julio, mi jam estis en la kongresejo je la naŭa matene, ĉar mi deziris partopreni en la tria kunveno pri la kongresa temo: "*Krei pacan ponton inter la popoloj: Zamenhof hodiaŭ.*" La diskutojn okazis en diversaj grupoj en la salono Lapenna. La plej grava demando estas: "Kion la hodiaŭaj 'pacaj batalantoj' de Esperanto povas lerni el la sperto kaj biografio de L.L. Zamenhof?" La diskuto en nia grupeto estis tre vigla. Hodiaŭ ni diskutis pri la temo: "Krei pacan ponton". Kiamaniere ni povos plej bone utiligi la heredaĵon de Zamenhof en nia moderna socio? Ĉu paco estas afero de lingvo? Kiel realigi lingvan demokration en nia mondo? Ĉu la revo de Zamenhof koncernis nur la lingvon?

Je la 11h00 mi reiris al la salono Lapenna, kie la membroj de la Centra Oficejo respondis al demandoj de la publiko. Multaj el tiuj demandoj ŝajnis al mi tro trivialaj por povi vere interesi la ĉeestantan publikon.

Je la 12h00 mi ĉeestis en la salono Sygnarski la kunvenon de EDE, la Eŭropa Demokrata

Esperanto-Partio, kiu atingis relativan sukceson en Francio kaj nuntempe provas organiziĝi en Germanio. La ĉefa celo de tiu partio estas atentigi la eŭropuniajn politikistojn pri la ekzisto, la celo kaj la eblecojn de Esperanto.

Je la 13h00 komenciĝis en la salono Lapenna la prelego pri Pollando kun la temo 'Johano Paulo II', kiu estis tre interesa. Neniu dubas, ke la granda pola papo esence kontribuis al la liberigo de Pollando kaj orienta Eŭropo de la malamata komunisma reĝimo.



Mi volonte estus ĉeestinta la koncerton de Ĵomart kaj Nataŝa kun Karina, ilia filino, je la 16h00 en la strato Legionowa, do en la urbo mem, kie okazis ĉiutage diversaj programeroj, kiel teatraĵoj kaj koncertoj, sed pro kiuj oni bedaŭrinde devis daŭre translokiĝi. La distanco al la urbo certe estis nevenkebla malhelpo por multaj kongresanoj ĉeesti ilin. Tio estas la sola negativa rimarko, kiun mi povas fari pri la cetere bonega kongreso.

Je la 17h00 Dobrzynski denove prezentis filmon en plenŝtopita salono Privat pri esperanta kongreso. Mi ne notis pri kiu, sed certe estis interesa filmo, kiel ĉiuj liaj filmoj.

Kaj je la 19h00 li denove prezentis filmon, nome *Sinjoro Tadeo*, kiu estas fidela filmara rakonto de la fama pola epopeo *Pan Tadeusz* de la plej granda pola poeto Adam Mickiewicz (1798-1855). Temas pri nobelara historio en la jaroj 1811 kaj 1812, verkita en preskaŭ 10.000 rimantaj versoj pri la lukto de Pollando pro ĝia libereco. D-ro Zamenhof petis D-ron Antoni Grabowski traduki la poemon en Esperanton, kion tiu ĉi faris, tiel riĉigante Esperanton per multaj novaj vortoj. Dobrzynski provizis la filmon per Esperantaj subtekstoj, kiuj estas versoj el la traduko de Grabowski. Bedaŭrinde oni ne havis sufiĉe da tempo por legi la ofte (tro) longajn subtekstojn. Entute tre rekomendebla kaj interesa filmo.

Vendredon, la 31-an de julio, je la 12h00 mi denove ĉeestis prelegon pri Pollando, ĉi-foje pri *La poleco en la pola muziko*, en la salono La-penna. Chopin, la plej granda pola pianisto kaj komponisto, popularigis la *mazurkan*, pola danco origininta el Mazurio, norda regiono ĉe la Balta maro. La polaj soldatoj kiuj batalis en Italio sub generala Dombrowski disvastigis la dancon en tiu lando.

Je la 16h00 en la salono Lapenna okazis la tradicia aŭkcio de esperantistaĵoj gvidata de prof. Humphrey Tonkin. Multaj en la grandnombra publiko ne venis por aĉeti malnovan esperantan objekton, sed por gustumi la sekhumurajn komentariojn de la profesoro. Novaĵo en tiu aŭkcio estis, ke neĉeestantoj ie ajn en la mondo povis oferti pli altan prezon ol tiu de ĉeestanto. Mi ne scias ĉu la novaĵo estis sukcesplena.

Je la 19h00 komencis en la salono Zamenhof la Internacia Arta Vespero, dum kiu multaj grupetoj de esperantistoj muzikis, kantis aŭ/kaj dancis. Denove elstaris la polaj grupoj per sia perfekta prezento.

Sabaton, la 1-an de aŭgusto, tuj post la malferma ceremonio taksio veturigis nin al la stacidomo, kie ni prenis la trajnon direkte al Varsovio. Sed pro teknikaj problemoj la trajno ne foriris. Post duonhoru da vana atendado ni elpaŝis kaj prenis taksion al Varsovio, ĉar ni timis maltrafi nian aviadilon. Ni ĝustatempe alvenis por preni nian aviadilon al Frankfurto,

adsl4you adsl4you

Verhoog je koopkracht met je internet- en telefoonaansluiting.

Scherp geprijsde adsl-aansluiting en GOEDKOOP tot GRATIS bellen met internettelefonie

**Adsl: € 26,95 incl. BTW
Download tot 40 GB
en tot 6 MB per seconde
Internet en voip-telefoon:
Bel gratis onder elkaar met internettelefonie VOIP**

**Bel: 02-88 873 350
E-mail: info@adsl4you.be**

kie ni devis transpaŝi en alian por flugi al Düsseldorf. Nia taksio ne longe atendigis nin tie kaj reveturigis nin hejmen. Je la tria matene mi malfermis la pordon de mia domo.

P.J. Doumen

Rakonto: La sorĉistino

(Verhaal: De heks)

Estis terure, kiel nia najbaro, meblisto Morel, blasfemis kaj furiozis de tempo al tempo. Pro nenio li koleriĝis. Mi tre bone memoras tion, ĉar tio estis la kaŭzo de tre malagrabra aventuro por mi.

Kiam jena historio okazis, mi estis nur okjara.

“Albert, vi devus honti! Knabeto de via aĝo, kiu blasfemas kiel pagano!” diris la patrino, tre indigna.

Ĝuste tie troviĝis la dramo... Tiun tagon – ni estis komence de aŭtuno – mi blasfemis kiel tiom da fojoj antaŭe. Mi eĉ ne scias kial, sed ŝajnis esti terura blafemo, kiun mi iel transprenis de meblisto Morel, en kies laborejo mi ofte pasigis mian liberan tempo.

Mi provis defendi min:

“Tiuj blasfemoj ests vortoj de viro, kiu ...”

“De brutala viro, vi volas diri!” interrompis min la patrino. “Brutala kaj vulgara!”

“La meblisto blasfemis nur unu fojon, kaj tio liberigas kaj malpezigas lin, kiam li koleras.”

“Vi ne devas ĉiam aŭskulti lin. Li estas vulgara viraĉo,” diris la avino.

“Jes,” konfirmis la patrino, kolereta.

Per tio ŝi metis finan punkton post nia konversacio kaj foriris. Sed mi estis tiagrade ekscitita, ke mi perdis la kapon. Oni kuraĝis ataki la mebliston, mian plej bonan amikon, mian solan veran amikon. Mi hezitis momenton kaj tiam diris:

“Tiel longe, ke mi volos kaj povos, mi aŭskultos Morel. Neniu malhelpos min fari tion!”

La patrino teruriĝis kaj turniĝis al mi. Ŝi rigardis min per tristaj kaj koleraj okuloj kaj diris en severa tono:

“Albert, post ĉio kion vi diris, mi opinias, ke estas necese trakti vin pli dure.”

“Trakti min pli dure, panjo? Kion vi volas diri?”

“Ĝis hodiaŭ vespere vi restos enŝlosita.”

Mi komencis plori kaj petegi ŝin:

“Panjo, ne, mi petas, ne enŝlosu min! Mi ne plu blasfemos!”

Sed ŝi prenis min je brako, trenis min tra la domo, malfermis pordon, puŝis min tra ĝi kaj tuj ŝlosis ĝin.

Estis terure malpura ĉambretetaĉo je la malantaŭa flanko de nia domo. Ĉiufoje kiam mi misfaris ion gravan, mi estis enfermita en ĝi. Min fortege naŭzis la obskureco, kiu regis tie, kaj la etaj bruoj, kiujn oni konstante aŭdis tie,

precipe la gratadon sub la hejtligno, kiu troviĝis tie staplita. La avino ĉiam diris, ke tiujn bruojn faras ratoj kaj ‘sepdormuloj’, kiuj lastaj bestoj estis ankoraŭ pli aĉaj ol ratoj. Ŝi preterlasis nenian okazon timigi min per ili.

Mi ankoraŭ petegis:

“Panjo, mi neniam plu blasfemos!”

“Mi konas viajn promesojn, filo.”

“Mi ĵuras, panjo...!” mi kriis tra la pordo.

“Vi jam sufiĉe ofte ĵuris, Albert. Mia pacienco estas elĉerpita.”

Kaj mi aŭdis, kiel la patrino foriris al la kuirejo. Ŝi klakfermis ian pordon kaj ne plu revenis.

Mi restis kelkajn minutojn senmova sur la sama loko kaj ĉesis plori, ĉar tio servis al nenio: neniu povis aŭdi min. Tiam mi turnis min kaj rigardis la internon de la ejaĉo. Miaj okuloj rapide kutimiĝis al la obskureco. Antaŭ mi kuŝis alte amasigita stako da ligno. Verŝajne tie estis nenio terura, eĉ ne araneo estis videbla, kvankam la araneaĵoj estis tiel dikaj kaj kovritaj de tiom da polvo, ke ili similis al malpure grizaj ŝtofaj girlandoj.

Ĝuste en la momento kiam mi ekpensis, ke la puno, kiun mi devis suferi, verdire ne estas tiel terura, io subite teruris min. Iu bruo venis de malantaŭ la lignostako. Tiam brue subfalas kelkaj pecoj da ligno kaj aperis ia hara korpo, kiu saltis suben. Mi retroiris kelkajn paŝojn, premis min per la dorso kontraŭ la pordon, fermis la okulojn kaj ekkriis. Mi sentis, kiel miaj haroj stariĝis sur mia kapo kaj mia koro ekbatigis, kvazaŭ ĝi volus salti el mia brusto. Ĉu estas rato aŭ sepdormulo? La avino iam rakontis al mi, ke tiuj bestaĉoj fojfoje atakas homojn. Kaj la knabeto kiu mi estis, certe ne estis tiel forto kiel plenkreskinta viro por defendi sin. Espereble la besto ne malsatis!

Sed neniu aŭdis mian kriadon, kaj per lasta preĝo mi preparis min morti.

“Dio mia, kompatu povran knabeton, kiu ofte montris sin malrespektama kontraŭ vi!”

Aŭdiĝis alia brueteto, kiu pli similis al gratado. Mi pinĉfermis la okulojn kaj daŭrigis mian preĝon per laŭta kaj tremanta voĉo.

“Kompatu povran knabeton, kiu estas tro severe punita de sia senkora patrino!”

Subite mi aŭdis mallaŭtan miaŭadon. Mia morta angoro kvazaŭe tuj malaperis, kaj mi malfermis la okulojn.

“Minou, kion vi faras ĉi tie?” mi demandis, moliĝinta.

Responde al mia demando, la nigra Minou denove tre mallaŭte miaŭis, dum ĝi trankvile rigardis min.

“Ĉu ankaŭ vi estas enŝlosita ĉi tie, mia kateto? Ĉu vi ankaŭ ne povas foriri de tie ĉi ĉar mia malica patrino malebligis tion al vi?”

Kompreneble ĝi ne respondis. Anstataŭ tio ĝi volbis la dorson, stariĝis la voston kaj

komencis ronroni, rigardante min per la malvarmaj okuloj de iu, kiun la sorto de alia lasas tute indiferenta. Mi forpuŝis ĝin.

“Foriru do, aĉa egoisto!”

Kaj Minu efektive foriris, sed malrapide kaj majeste, kiel decas al kato. Unue ĝi proksimiĝis al la pordo, priŝarlis kaj palpis ĝin per siaj longaj lipharoj kaj konkludis, ke ne utilas lacigi sin, provante malfermi ĝin: ĝi estis bone fermita. Tiam ĝi retiriĝis al la lignostako, post kiu ĝi malaperis

Regis longa periodo da silento kaj resignacia atendo. Tiam mi aŭdus novan bruon. Iu aŭ io frapis kontraŭ la fenestreto, kiu troviĝis malantaŭ la lignostako kaj eliris sur la herbejon de farmisto Maillard. Ĝia vitro jam delonge estis rompita kaj anstataŭigita per ligna tabulo. Kiel mi povis forgesi tiun fenestreton! Tiun eblecon eskapi el mia malliberejo mi tute pretervidis!

Ek al libereco!

Mi liberigis la fenestreton de ĉiuj obstakloj, kiuj kaŝis ĝin: centoj, eble miloj da lignopecoj, kiujn mia avo amasigis tie por provizi la stovon per heiltligno. Estis granda laboro por okjara knabeto forigi ĉion ĉi, sed mi havis sufiĉan tempon, kaj mi estis kontenta tiamaniere povi venĝi min al mia patrino. Mi jam etendis la manon por malfermi la fenestreton, kiam mi aŭdis la voĉon de mia avino je la alia flanko de la pordo.

“Albert, via patrino rakontis al mi ĉion. Ĉu vi promesas ne plu diri tiajn terurajn vortaĉojn?”

Mi tenis min kvietaj kaj respondis nenion. Sed ŝi reprenis:

“Albert, ĉu vi aŭdas min?”

Mi silentis, ĉar mi jam decidis eskapi tra la fenestreto kaj forlasi la domojn, kie mi estis tiel malbone traktata. Tamen post iom da pripensoj mi tre mallaŭte respondis: “Jes”, sed la avino ne aŭdis tion.

“Ĉu la sinjoro ankoraŭ koleras? Ĉu li preferas ne respondi kaj resti en la lignotenejo? Tre bone! Sed mi avertas tiun sinjoron: se li estos ankoraŭ ĉiam tiel senparola, kiam mi revenos el la ĝardeno kun legomoj, mi eliros lin el la tenejo kaj kondukos lin al la arbaro Alamé!”

“La arbaro Alamé?” mi mallaŭte murmuris, iom terurita.

“Jes, al la arbaro Alamé”, ripetis la avino, kvazaŭ ŝi aŭdis mian murmuradon, “kaj mi transdonos vin al Babouse, la sorĉistino. Vi ja scias, tiu virinaĉo kiu ŝanĝas malbonkonduktajn infanojn en talpojn aŭ musojn. Ŝi havas...”

“... longajn ungojn kaj longan nigran hararon”, mi diris samtempe kun ŝi.

Ankoraŭ la antaŭan tagon la avino estis minacinta min per tiu virinaĉo, ĉar mi rifuzis manĝi la celerion, kiun ŝi stufis kaj kiesodoro ĉiam plenigis min per naŭzo. Kiam, unu horon poste, mi havis la malfeliĉon rompi mian bote-

lon de vitaminoj – mi ĵuris, ke estis akcidento, sed ŝi ne kredis min, ĉar mi ne ŝatis gluti tiun aĉan likvaĵon –, ŝi denove minacis min, promesante, ke ŝi diros tion la Babouse, la sorĉistino.

“Pripensu, Albert,” ŝi finis malantaŭ la pordo kaj foriris, murmurante ion, kion mi ne komprenis. Poste mi aŭdis kraki la latbarilo de la ĝardeno.

Mi subridis. La sorĉistino en la arbaro Alamé! Bone trovite, avino. Antaŭe tio eble povis stimuli infanojn al pli bona konduto, sed hodiaŭ tio estas eksmoda: mi ne kredas je la ekzisto de tiu pridubinda sinjorino. Cetere Morel plurfoje certigis min:

“Ne loĝas pli da sorĉistinoj en la arbaro Alamé ol elefantoj en mia ĉapelo. Tio estas rakonto elpensita de maljunaj virinoj por timigi knabetojn kiel vin. Cetere sorĉistinoj tute ne ekzistas.”

Kaj li ekridegis laŭte kaj plenkore kaj forte frapis min sur la ŝultron. Mi rigardis lian vizaĝon por vidi, ĉu li eble mensogas. Sed liaj okuloj brilis tiel amike kaj sincere, ke mi ankaŭ laŭte kaj plenkore ridegis. (Daŭrogota)

La Limburga Esperanto-Asocio

(*De Limburgse Esperantovereniging*)

Aktivaĵoj en novembro kaj decembro 2009:

La 26-an de novembro Albert Claesen el Diepenbeek eksplikis al ses ĉeestantoj la funkciadon de la Esperanto-Forumo, kiun li mem kunmetis por permesi al la Esperantistoj rete interkomuniĝi. Liajn eksplikojn akompanis bildoj projekciitaj per *beamer* sur ekranon, kiujn prezidanto H. Schutters disponigis al li. La 17-an de decembro kunvenis sep personoj je la 19h30 en la kafejo-restoracio *'t Torenhuis* en Peer flanke de la preĝejo por soleni per festmanĝo la 150-an datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof, la kreinto de la lingvo Esperanto. Ĉe la eniro ĉiuj ricevis senpagan aperitivan de la domo. La manĝo, laŭ ĉiuj partoprenantoj, estis tre bongusta. Ĉar la kafejo jam fermiĝis ja la naŭa, ni iris al la nova kafejo *De Boskar*, kiu estis instalita en la malnova sepdekjarcenta urbodomo.

Aktivaĵoj en januaro kaj februaro 2010:

La 28-an de januaro 2010 Jan Doumen prelegos pri la antikvaj Belgoj, kontraŭ kiuj batalis Julio Cezaro.

La ludo “Serĉu la vorton” gvidota de Henri Schutters estas prokratita al posta dato.

La 25-an de februaro 2010 Marcel Delforge, prezidanto de Esperanto Valonio, venos al Peer por paroli al ni pri la situacio de Esperanto en Valonio.